

EKO 2023

**Pensu globe
Agu loke
Por la landa,
Fakaj kaj
Regiona
Laboro**

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komuniko



**Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj,
Komercestoj, Blinduloj, Kolektantoj**

EKO 2023 / 10. Februaro 14, 2023

Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK

Seviljo gastigos la hispanan kongreson

En oktobro 2023 okazos en Seviljo la 81a Hispana Esperanto-Kongreso. La unuan tagon (11-an) oni spertos sciencajn prelegojn, atelierojn kaj similaĵojn en la Universitato de Seviljo. Kelkaj profesoroj decidis eklerni nian lingvon kaj Esperante prelegi tiun tagon rilate al siaj fakoj. Tiuj kuraĝaj komencantoj estos akompanataj de hispanaj profesoroj, kiuj jam komforte prelegas Esperante. Tio okazos ĉeeste.

Tamen mi planas montri en mia universitato, ke Esperanto universitate viglas. Do mi petas al vi ĉiuj, kolegoj, pripensu partopreni eĉ neĉeeste. Universitatano estas homo, kiu ne havas tempon aŭ kutime plendas pri tio. Tamen, eble vi trovos manieron atingi momenton la 11-an de oktobro kaj virtuale prelegi aŭ prelegeti pri via fako. Aŭ, se vi deziras, eĉ antaŭpretigita video estos bonvena. Bonvole ne hezitu kontakti min por la celo kunpensi pri, kiel vi povas plej komforte kunlabori por tia videbligo de nia lingvo en la universitato.



Viko, Civiencia. Esperanta entrepreno por la demokratiigo de la scienco,
Universidad de Sevilla (Hispanio);
Université de l'Espoir (DR Kongo)

UN-bulteno 62 – homaj rajtoj havas jam historion

Numero 62 – januaro – februaro 2023

- Universala Esperanto-Asocio markas 75 jarojn da sindediĉo al homaj rajtoj.
- La Zamenhofa Tago honoras la kreinton de Esperanto.
- Revuoj en Esperanto kovras la mondon.
- Nacia premio honoras polan esperantiston.
- Komitato traktas lingvajn kaj minoritatajn rajtojn.
- La Komunumo de NROj estas nesufiĉe engaĝita de UN, laŭ reprezentanto de UEA.

Penseo 376; plezuro por poetoj,

Trovu la bultenon alkroĉitan. Kune eroj el Ĉinio, Italio, Hispanio, Brazilo, Germanio kaj pliaj landoj.

Opinio el Hungario de konata aktivulo

La vera ŝlosila problemo estas tio, ke la homoj dum/post la kursoj ne iĝas anoj aŭ membroj de la Esperanta komunumo, tiel ili rapide forgesas ankaŭ la lingvon, do perdiĝas ĉiom nia ĝiŝtiam laboro... :-(- Anstataŭ daŭre nova varbado ni devus meti la pezocentron al reteno de niaj kursfinintoj...



Multaj eble ne scias, ke "Eventoj" estis Esperanta gazeto, aperinta inter 1992-2002 en ĉiu dua semajno, do ĝi tiam (antaŭ la interreta epoko) estis la plej ofta, funkcia informilo.

Forpasis insista edukistino

De: [edukado.net](mailto:redaktanto@edukado.net) <redaktanto@edukado.net>

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova trista ero ĉe Novaĵoj.:

Titolo: Forpasis Sophia Mensen (NL)

Kategorio: Laste ĉe edukado

Teksto: Ni kun malfeliĉo sciigos al vi ke en januaro 2023 forpasis en Nederlando Sophia Mensen. Ŝi estis Cseh-instruistino, gvidanto de kursoj en Nederlando, Francio kaj Germanio. Antaŭe ŝi aktive agadis en ILEI. Ŝi en la sepdekaj jaroj instruis Esperanton ankaŭ en la Montessori lernejo, kies direktorino ŝi estis.

Malfrua invito

La 21-a de februaro estas la Tago de la Gepatra Lingvo kaj Itala Esperanto-Federacio organizas Zoom-kunvenon ESPERANTISTOJ KAJ LA GEPATRA LINGVO. Oni invitas vin ĉiujn por pridiskuti la temon la 21-an de februaro je la 21.00 (UTC +1). Prezentos la temon Humphrey Tonkin, Francois Lo Jacomo, Renato Corsetti kaj aliaj kiuj okupiĝis pri la preparo de la internacia flugfolio en diversaj lingvoj kaj de la mesaĝo por la Tago.

Eniro tra Zoom

<https://us02web.zoom.us/j/85825764359?pwd=QThBQWVldmZacDFCczlwaVp3QVdXdz09>

ID: 858 2576 4359; Paskodo: 670900

Sumoo pezas plu sur la pejzaĝo

La 79a Internacia Esperanto-Sumoo

De la 8a ĝis la 22a de januaro 2023

Nia retejo: <http://www.esperanto-sumoo.pl/>

Sumoo en Vikipedio:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo

Fejsbuko: <https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>

Partoprenis en la ĵusa sesio 317 personoj el 33 landoj kaj unu regiono. La plej signifaj landoj estas Japanio, Koreio, Francio kaj Brazilo. La nombro de paĝoj legitaj en la sesio sumas je 17 200. La sekva sesio okazos inter la 19-a de marto kaj la 2-a de aprilo.

Kursoj en Koreio

Mi informe raportas pri la kursoj de Esperanto en Koreio precipe en universitatoj

(1) Kurso: Enkonduko pri Esperanto:

Instruisto: SHIN Hyunkyu

Loko: Hankuk-Universitato de Fremdaj Studoj - Seulo-Tereno

Fojo: 1 leciono ĉiusemajne dum 15 semajnoj en unu semestro

Nombro de studentoj: preskaŭ 55

Nivelo: Baza

(2) Kurso: Enkonduko pri Esperanto

Instruisto: SHIN Hyunkyu

Loko: Hankuk-Universitato de Fremdaj Studoj - Yongin-Tereno

Fojo: 1 leciono ĉiusemajne dum 15 semajnoj en unu semestro

Nombro de studentoj: preskaŭ 25

Nivelo: Baza

(3) Pri la instruisto

Nomo: SHIN Hyunkyu (esperante, Mondero)

Retadreso: shinhyunkyu@hufs.ac.kr

Specialo: Lingvistiko de la Korea lingvo (Fonologio)

Informante kiel supre mi aldonas, ke la instruisto ankoraŭ ne aliĝis al ILEI, tamen aliĝos plej baldaŭ. Vi povas havi kontakton kun li per la reto.

Stelesperanto en EsperRadio

Ekde la numero 18 la bulteno STELESPERANTO estas ankaŭ en la kanalo youtube de EsperRadio. Do ankaŭ tiuj kiuj ne uzas Facebook povas spekti ĝin. Jen la ligilo de la lasta numero 020: <https://youtu.be/959vNSPiSTc>. La bulteno NSiR (en podkasta formato) estas en la youtuba kanalo de EsperRadio.

Se vi aliĝas al la kanalo vi povas ankaŭ elekti ĉu ricevi informojn kiam estas novaĵoj.

Ondo da jubileoj en februaro

Louis Beaucaire, Jean Forge, Helmar Frank, Nikolaj Ĥoĥlov, Hugo Steiner, Yosimi Umeda kaj aliaj esperantistaj eminentuloj estas en la listo de Esperantaj jubileoj kaj memordatoj por februaro 2023, kompilita de Aleksander Korĵenkov kaj publikigita hodiaŭ en la novaĵretejo "La Ondo de Esperanto". Uzu ĝin en viaj informiloj, blogoj kaj podkasto <https://sezonoj.ru/2023/02/februaro-8/>

Onda demonstrado

Aperis en la reto demonstra pdf-versio de la vintra (laŭ la nordhemisfera vidpunkto) eldono de "La Ondo de Esperanto" (2022, № 314), kiun la abonantoj ricevis je la novjarfesta nokto. La 49-paĝa demonstra versio enhavas kelkajn plenajn tekstojn kaj plurajn tekstokomencojn el la riĉenhava kaj rekorde ampleksa Aperis la 139-paĝa vintra "Ondo" (2022, №314). Legu la demoversion kaj decidu pri (re)abono por 2023 <https://sezonoj.ru/2023/02/ondo-109/>

Kultura kaj informa sukceso en Italio

La prestiĝa kultura revuo Micromega aperigis artikolon pri la itala traduko de "La infana raso" de William Auld kune kun artikolo de la tradukinto, Nicolino Rossi, pri la literaturo en esperanto:

<https://www.micromega.net/mappe-del-nuovo-mondo-carol-oates-william-auld-e-nicolino-rossi/>

Informoj de Michela Lipari kaj Renato Corsetti.

Indekso de EKO 2023, 1 ĝis 10 alkroĉita

Ĝis hodiaŭ aperis jam dek eldonoj de EKO en 2023. Jen indekso pri la enhavo.

===== vortoj: 1125 =====

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro de 2014.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.